



De COVID-19 ĝis la kolapso de nia civilizo.

En [Internacia Solidareco Andaluzio \(Solidaridad Internacional Andalucía, SIA\)](#) kortuŝitas pro la nombro de mortintoj dum la sana krizo kaŭzita de la kronviruso. Ni ne povas imagi la doloron de iliaj familianoj kaj amikaro pro la vivoj ĉesigitaj je tiom malfacilaj kaj esceptaj cirkonstancoj. Ni ofertas nian karesegon al ili kaj ni deziras, ke ili havu la plej altan bonspiriton.

Ni ankaŭ konvinkitas, ke la kunlaborado kaj la solidareco —principoj, kiuj priskribas nin— nuntempe kaj je tiaj cirkonstancoj pli gravas ol neniam antaŭe, kaj pro tio ni deziras kunhavigi kelkajn pripensaĵojn, kiujn ni taksas bezonataj. Sen celi malpezigi ĝin, la Kronviruso-19 ne kernas por nia zorgo: **pli gravas, ke ni forgesis, ke ni malfortas, vundeblas, interdependatas kaj dependetas de la medio; kaj ke al ni mankas komunumaj strategioj pri zorgado, kunlaboro, interapogo kaj tio, kio pli nuntempe evidentas, sansistemo forta kaj por ĉiuj.**

De SIA jarojn ni profundiĝas en la diagnozo, kiuj defendas, **ke ni enmetiĝas en profundan sisteman krizon, kiu nepre alportas nian civilizacion ĝis la kolapso.** Temas pri procezo historie rapida sed malrapida je la vidpunkto de niaj vivoj. **Eĉ pli kaj pli da fakuloj koincide asertas, ke ĉi tiun jardekon ni povos rimarki profundajn ŝanĝojn je la mondo, je la ĉirkaŭaĵo kaj sendube je niaj vivoj.** Kaj ilustrantas komenci 2020 per ĉi tia escepta situacio.

Ni trafas la kolapson per spirala movo, kiu alportas nin de unu ĝis alia krizperiodo kun intertempo, kies resaniĝo ĉiufoje malpli kontentigas. Iu ajn povas rigardi tion: la resaniĝo post la krizo de 2008 neniam redonis al ni la antaŭan bonstatan reĝimon, kaj nun ni ekeniras en pli malbonan krizon ol tiu... Je la fino de kardiografia registro progresive pli malforta kaj konfuziga la kardiografilo nun povas sendi al ni la sonon de nia civilizacia kolapso.

Kaj ĉi tiu sana alarmo videbligas kelkajn aferojn, kiuj rilatas al kaŭzoj de tia "kardiografio". Ekzemple, **ke la realigo de sana sistemo forta kaj por ĉiuj ne devas dependi de limoj aŭ normoj pri monelspezoj¹, nek kongruas kun la privatigema logiko; ke la zorgado fundamentas por la tenado de la familio, la komunumo kaj la vivo; ke per politika volo eblas realigi fortegajn rimedojn alfronti problemojn tiom gravaj kiel la klimata ŝanĝiĝo, kaj ke la civitaneco pretas fari neimageblajn sinoferojn por la komuna bono².**

Ankaŭ reliefiĝas, **ke se Ŝtatoj minacitos, ili ne dubos surstratigi armeon por kontroli la popolon.** De tia vidpunkto, **la tutmondaj nuntempaj decidoj povas esti komprenitaj kiel eksperimentoj por klontrolado de la socio** por tiaj antaŭvideblaj situacioj devenitaj de la kolapso. Kaj kvankam ne tiom videblas ŝajnas, ke la kronviruso estos la perfekta kaŝilo por malkomforta vero, kiu jam estis vaste disanoncita: **nia ekonomia modelo kaj ĝia mantro pri sinsekva kresko alportas nin ĝis sakstrato. Estos kaŝita, ke antaŭ la alveno de kronviruso-19, ni jam enirantis en krizon sen antaŭaj similecoj;** kronviruso-19 estos kulpita kaj oni asertos, ke endas penego por teni la ekonomian kreskon, por la ĉiama profito de iomete da homoj je la kosto de la planedo.

¹ Rimarkendas, ke la mankoj de nia sana sistemo videbliĝas nur tri monatojn post la ekvalidigo de la artikolo 135.2 de la Baza Leĝaro modifita de PSOE kaj PP en 2011 por limigo de la publika elspezo en la administraciaj buĝetoj.

² Same kiel ĉiam, en ĉi tiaj cirkonstancoj endas suferi pro la dramo de la landlimoj, ĉar ĉu imageblas, ke sur niaj stratoj starigus tranĉodrataj bariloj same kiel okazas en Ceŭto aŭ Meliĝo, por eviti, ke familioj iras surstraten por aĉeti, dum Amazon-o daŭre movas pakaĵojn de unu al alia flanko?

En SIA ni nek deziras armigitan socion nek akceptas, ke ni devas daŭre elekti la kreskadon. Ni revas socion, kiu estu konscia kaj engaĝigata al alia mondeblo. Pro tio ni de antaŭe esploras, proponas kaj starigas projektojn pri esplorado, instruado, sentemigado kaj internacia kunlaborado, kiuj kun la propono de la malkreskado kaj kunigitaj sub la devizo "loka rezisto kaj tutmonda justeco", proponas kelkajn eksolvojn kaj transformigajn respondojn por alfrontado de nuntempaj kaj venontaj defioj.

Por scii pli kaj aliri al videoj, tekstoj ktp, iru ĉi tien: <http://www.solidaridadandalucia.org/coronaviruscolapso/>